



| ENHAVTABELO | Paĝoj |
|---|---|
| Gérard kaj Jeannine tradukis la artikolon Veneno por flegi. La veneno de iuj bestoj povas malsanigi aŭ eĉ mortigi homojn, sed en tiu artikolo ni malkovras, ke ĝi estas uzata de la esploristoj de la farmacia industrio por finpretigi medikamentajn novajn molekulojn. | 1 2 kaj 3 |
| La printempo estas la sezono de floroj. Sed ĉu vi konas tiujn florojn, kiuj disfloras komence de ĉiu jaro en niaj ĝardenoj kaj sur niaj gazonoj ? La dokumento prezentas kelkajn el ili, montras fotojn, kaj rakontas iom pri ilia historio. | Paĝoj 3 kaj 4 |
| En 2020 en Francio mortis 90 virinoj sub la batoj de sia kunvivanto. Aliaj estas grave vunditaj. Jean-Mary esperantigis verketon de Marie Quinio, aperintan france en la retejo short-edition.com, kiu rakontas pri la restado en malsanulejo de unu el tiuj batitaj virinoj. | Paĝoj 5 6 7 8 |


## VENENO POR FLEGI

Toksinoj produktitaj de venenaj bestaj specoj povas servi kiel bazoj al la disvolviĝo de medikamentoj kontraŭ la doloro, la diabeto aŭ la kardiovaskulaj malsanoj.

De Pauline Hervé

Vi abomenas la etajn kaj dikajn bestetojn ? Tamen, eble vi estas kuracita sen scii tion, dank'al la veneno de serpento, lacerto aŭ vi estos flegata en la venontaj jardekoj. Pli ol 173 000 bestaj venenaj specoj ekzistas sur la planedo kaj ili konstituas gigantan rezervon por la medicina esplorado.

**Kompleksaj substancoj**

La klarigo troviĝas en la konsisto de venenoj, kompleksaj substancoj konsistantaj el centoj da malsamaj toksinoj. Ĉiu el ili efikas potencege kaj precize sur unu funkcion aŭ sur unu organon de celita predo. Estas tio, kio igas la venenon efika. Sed kio mortigas aŭ vundas tiel efike, tio povas ankaŭ kuraci.

La unua malkovro pri ebla terapeŭta efiko datiĝas de la 1970aj jaroj, raportas Denis Servent, respondeculo de la Laboratorio Toksinoj, receptoroj kaj jonaj kanaloj en la CEA Centrejo de Saclay. Brazilaj esploristoj rimarkis, ke ĉiuj personoj morditaj de preciza serpento suferis imponajn tensiofalojn. Ili studis la konsiston de ĝia veneno por izoli la koncernatan molekulon. Tiu poste ebligis la koncepton de medikamento kontraŭ la hipertensio : la Captopril. Nun, multaj malsanuloj kuracataj pro hipertensio estas flegataj per medikamento de tiu familio.

**Neŭtraligi la toksan efikon**

Izoli la aktivan molekulon de la veneno, neŭtraligi ĝiajn eventualajn toksajn efikojn kaj uzi ĝian efikon kontraŭ preciza simptomo : tiel povas la toksino iĝi medikamento. « La venenaj toksinoj estas bonegaj kandidatoj por estontaj medikamentoj, aldonas Denis Servent, dank'al sia forta afineco (la rekta influo, kiun ili havas sur la receptorojn, enzimojn aŭ jonajn kanalojn de la organismo) kaj sia granda selektiveco (ili blokas precizan receptoron kaj ne la alian, kio evitas la kromajn efikojn). » Nu afineco kaj ricevemo estas la fundamentaj kriterioj por noviga, medikamenta molekulo.



Monstro de Gila

Oni taksas, ke ekzistas, inter ĉiuj venenaj specoj de la planedo, dekoj da milionoj de malsamaj toksinoj. Nuntempe, scienco identigis nur kelkajn milojn. La freŝdataj atingoj de la esploro, estas ligitaj al la teknikaj progresoj (bildaro, informteknikoj aplikitaj al la biologio), kiuj hodiaŭ ebligas observi, sekvenci, izoli kaj poste sintezi la malsamajn toksinojn, kiuj konstituas la venenojn.



Mara konuso

**Medikamentoj jam sur la merkato**

Unu deko da molekuloj devenintaj el la venenoj jam estas sur la merkato. La « Tirofiban », ellaborita el la serpenta veneno, helpas preventi la riskojn de miokardia infarkto. La salivo de la monstro de Gila, lacerto, ebligis krei kuracilon kontraŭ la dua speco de diabeto. La veneno de la mara konuso, eta molusko, naskis antidoloron hiperpotencan sorbigitan al la pacientoj, por kiuj morfino ne plu sufiĉas. Neniu el tiuj medikamentoj estas farita rekte per la veneno : la kvantoj produktitaj de iaj bestoj estas tro malgrandegaj kaj la laboratorioj laboras nur per sintezaj molekuloj, kiuj reproduktas la toksinon sen ĝiaj nocaj efikoj.



Alia mara konuso

**Doloro, diabeto, kardiovaskulaj malsanoj**

La aktualaj esploroj pri aliaj venenoj estas je fundamenta stadio kaj la livertempo por disponigi molekulojn en la medikamenta merkato, estas longa : ĝenerale 15 ĝis 20 jaroj. Sed la malkovroj estas promesplenaj en pluraj kampoj : lukto kontraŭ la doloro per molekuloj pli fortaj ol la opioidoj, lukto kontraŭ la diabeto, kontraŭ la kardiovaskulaj malsanoj, kontraŭ kelkaj aŭtoimunaj malsanoj, renaj malsanoj…

Aŭstraliaj skipoj ankaŭ antaŭenigas la ellaboradon de insekticido enhavanta aranean venenon, kiu povus anstataŭi la produktaĵojn entenantajn neonikotinoidojn nocajn por la homa sano.

La bestaj specoj venenaj kaj iliaj valoraj toksinoj povus konsekvence konstitui planedskale medikamentujon de la futuro. Estas okazo, se necesas, memorigi kiomgrade la biodiverseco de la specoj estas multvalora por la homa speco kaj por ĝia sano.



**La eŭropa banko de toksinoj**
La scienca projekto Venomics, lanĉita en 2011 kaj apogita de Eŭropa Unio, celas kolekti kaj analizi la venenon de 200 bestaj specioj.

**La eŭropa banko de toksinoj**

Per la naturaj datumoj kolektitaj kadre de la scienca projekto Venomics (vidu la enmetaĵon ) la

sciencistoj sintezos 4000 peptidojn, la molekulojn, kiuj konstituas la toksinojn, por poste testi ĝiajn efikojn sur iom da patologioj ( kardiovaskulaj malsanoj kaj diabeto, interalie) kaj antaŭenigi la esploradon al kuraciloj. Tio igas Venomics la plej granda banko de sintezaj toksinoj en la mondo.



Korna vipero

**« Venena bieno » en Belgio**



Latrodectus tredecimguttatus

Alphabiotoxine ne estas entrepreno kiel la aliaj. En ĝiaj muroj, en Belgio, oni bredas pli ol 300 « etaj gastoj », kun prizorgego por kolekti ilian venenon. Estas komplekse kaj necesas longa tempo por rikolti en natura medio la venenojn de kelkaj specoj.



Skolopendro

En la entreprenoj, kiel tiu-ĉi, serpentoj, araneoj, skolopendroj estas regule « melkitaj » por sia valora veneno. Tiu-ĉi servos kiel krudmaterialo por la fundamenta esploro pri la terapeŭtikaj povoj de la venenaj toksinoj.

Artikolo eltirita el « Essentiel Santé Magazine- Harmonie Mutuelle – Junio 2019.

## IOM DA HISTORIO PRI IUJ FLOROJ

### JASMENO



Somera jasmeno



Vintra jasmeno

Uzata en Ĉinio por parfumi teon, kaj ornami ĉapelojn, ĝi invitas al vojaĝo, rememorigante orientajn pejzaĝojn, kiam ni spiras ĝin. Malgraŭ sia rava flanko, ĝi signifas arablingve « malespero kaj mensogo ». En Sicilio, ĝiaj floroj utilas al sorĉistinoj por elŝiri amon el la koroj de viroj.
Iu parfumo de Coco Chanel portis ĝian nomon.
La urbo Grasse en Francio profitas de favora klimato al ĝia kulturo. Frederico Garcia citas ĝin en siaj poemoj.
Ĝi mildigas la malbonojn, sed ne kvietigas la turmentojn de la junaj poetoj.

### ANEMONO





Malesperinta pro la morto de sia amanto Adoniso, la diino Afrodito ŝprucigis ĝin el la sango de lia vundo.
Alnomata « floro de la vento », ĉar ĝi malfermiĝas kiam blovas, ĝi originas el bordoj de Mediteraneo, kaj plej ofte kreskas norde, de ĝia enkonduko en la deksesa jarcento.
Ĝi amas disvolviĝi duonombre kaj malvarmete de subarbejo, kie ĝi kaptas lumon komence de printempo.
Simbolo de tempo, atendo, persistemo, ĝi pli majeste kaj bele renaskiĝas.
Flavkolora, ĝi favoras fidon, ruĝkolora, ĝi triumfas dank' al pacienco.


### CEJANO



Kun siaj lancetformaj kaj vilaj folioj, ĝi timeme disvolviĝas.
Ĝin la Egiptoj desegnis sur tombaj muroj, kaj la Helenoj uzis dum ludoj.
La centaŭro Chiron gloris ĝian efikon kaj la diino Flora benis ĝin, memore al infano.
Iam ĝin la ŝafpaŝtistinoj krone portis por sin protekti kontraŭ malbona sorto.

Nun ĝiaj fortigaj kvalitoj por la haŭto, ĝiaj kvietigaj efikoj por la okuloj estas rekonataj.
Ĝi posedas la koloron de la paradizo, simbolante samtempe oferon kaj savon.

## GLADIOLO



Ĝi devenis de Sud-Afriko en la deknaŭa jarcento, kaj amas speciale la varmon de mediteraneaj regionoj, de Kanarioj.
Ĝi estas tiel nomata pro siaj folioj glavoformaj.
Ĝiaj floroj spikoformaj elvokas garbojn da tritikoj, cetere ĝi estas alnomata gladiolo de grenrikolto.
Ĝi spontanee kreskas en la kampoj kultivitaj, ordigante la naturon per siaj longaj folioj.
Aristokrata, ĝi havas preferon por lukso, pompo, kaj tronas sur tabloj de granda societo.
Ni retrovas ĝin en la brakoj de kantistinoj, fine de prezentado.

## KONVALO



Ĝi elvokas la tagojn de la plej dolĉa jara monato, liberigante tonikan, fortigan kaj gajan parfumon.
Ĝi amas malsekecon, kaj plaĉas al la kudrantaj majstroj kaj elegantulinoj de la urbo Nantes, kiu ĝin malsovaĝigas de multaj jaroj.
La plej freŝa el la floroj naskiĝus sovaĝe en subarbeja duonombro, celebrante amon kaj renaskiĝon.
Foje ĝi estas alnomata « larmoj de Nia Damo », ĉar ĝi elvokas la plorojn de la Virgulino Maria, piede de la kruco.
Ĝiaj kloŝetoj svingiĝas laŭvente, kiam ĝi plekte kuŝiĝas sur fraŭlina hararo.



## LILIO

En Egiptio ĝi simbolas reviviĝon dank' al Isis, en Grekio ĝi fariĝas « la frato de la Lakta Vojo ».
Naskita de laktoguto de Hera, diino de la edziĝo, ĝi estas dediĉita al la Virgulino Maria, kiu estas simbolo de pureco.
Piedpremi ĝin neprigas malsukceson, sed pluki la unuan de la sezono certigas sukceson.
Nombre de tri en la kavalirismo, ĝi elvokas kredon, saĝon kaj lojalecon.
Ĝia parfumo malproksimigas la serpentojn.

## TROPEOLO



Ĝi vekis la emon de Luizo La Dekkvara por la pasioj, kaj Mme de Maintenon ĝin ricevis de la mano de la Sunreĝo.
Iam al ĝi ni atribuis propraĵojn helpantajn al vunda cikatro, kaj entenon je vitamino C, kiu donas energion, eĉ afrodiziajn efikojn.
La floroj gustumiĝas, ornamante per siaj varmaj koloroj, diversajn salatojn.
Ĝin ni eltrovis en arbaroj en Bolivio kaj Peruo, kaj estis alnomata « sanga floro de Peruo ».
Ĝi posedas alian alnomon, kiel « kreso de Meksikio ».

# Mia aktiva voĉo de Marie Quinio

Iom tordante min mi sukcesas kapti mian telefonon sur la litkapo. Mi malfermas la aplikaĵon "Nature Sounds" (NaturSonoj) kaj premas la malgrandan simbolon de la abio. Arbarbruoj leviĝas en mia dormoĉambro. Mi plilaŭtigas la sonon, sed ne tro. Mi ne plu elportas la tro fortajn bruojn. Ĉiufoje, kiam mi lanĉas tiun aplikaĵon, mi havas la impreson, ke mi rekonektiĝas kun la vera mondo. Ke mi iom remalkovras la vivon. Birdoj kantas, kaj aŭdiĝas la bruo de akvofalo fore. De tre longa tempo mi ne iris en arbaron. Mi povas aldoni grilojn, se mi volas eniĝi en etoson de somera arbaro, aŭ bufojn, se mi volas imagi min apud valo tagfine. Sed sufiĉas...

Imagi estas unu el la solaj verboj, kiuj restas al mi. De kiam mi estas izolita sur tiu hospitallito. De tri monatoj nun.

Li estis arestita. Sed ankaŭ mi estis iel haltigita. En mia vivo.

Ŝajnas, ke ĉiusemajne en Francio ni estas du virinoj, kiuj mortas sub la batoj de niaj kunvivantoj aŭ ekskunvivantoj. Kaj tiu cifero verŝajne estas eĉ pli alta mondskale. Ĉu mi devus senti min senpezigita, ĉar mi ankoraŭ ne mortis ? Mi hezitas respondi... La trotuaro alvenis tiel rapide, kiam li elfenestrigis min. Kiam li kriegis, ke mi estas nur fiulino, rubo, fekulino. Li unue restarigis min de la malmola planko de la balkono, kie li estis batsveniginta min kaj lasinta preskaŭ senkonscia, por senhezite levi min super la balustradon. Forĵeti min sur la bitumon kiel malpuran akvon, forpeli min el la dua etaĝo kiel dikan malpuraĵon. Mi kaptis lian brakon provante reteni lin, sed mi komprenis, ke fine tio estos la plej bona afero kiu povas okazi al mi nun. Mi malpremis lian brakon. Liberigi min. Morti fine. Kun la kapo frakasita kontraŭ la trotuaro. Premegata de ĉagreno



kaj malespero. Premegata sub la pezo de liaj malnoblegaj vortoj. Premegata sub pezo lia, sub liaj batoj, sub liaj insultoj. Premegata de jaroj de perforto kaj de ĉiutagaj humiligoj. Premegata de... Mi uzas la pasivan voĉon. Kiam oni estas persekutata kaj batata, nia vivo skribiĝas en la pasiva voĉo. Pasiva voĉo ĉar pasiva vivo. Vivaĉo. Dum ĉiuj ĉi jaroj estis mi merdo, tiu kiu gluiĝas al la kalkanumo de la ŝuo. Mi ne plu memoris mian antaŭan vivon. Tio estis fariĝinta mia sola vivo.

Premegata ankaŭ de honto. La demando, kiun ĉiuj starigas, kiam ili malkovras nian kalvarion : « Sed... kial vi neniam foriris ? » En ĉiu el tiuj demandoj, en

ĉiu el tiuj nekredemaj rigardoj, en la dubema, preskaŭ akuza tono, estas mi, kiun oni agresas denove. Kial oni ĉiam petas de la viktimoj, ke ili klarigu la kialojn de sia agreso ? Kial oni ĉiam dubas pri ilia parolo ? Oni demandas neniam, kiel eblas, ke viro, homo, malbone traktas alian homon, aŭ kiun edukadon la turmentisto ricevis por kredi, ke alia persono povas aparteni al li korpe kaj anime. Kontuzita korpo, kaj apatia animo. Mi ne konas la taksadon por la batitaj homoj. Viro aŭ virino, estas la sama sufero, la sama psikologia dependeco, kiu instaliĝis iom post iom. Ĉiuj oni konas la saman historikomencon, rozan, glatan, brilan. Poste oni lasas sin enfermi malrapide en teruran spiralon, el kiu oni neniam eliras, aŭ ĉiukaze neniam senvunda. Komence oni konservas esperon, ne komprenas tion, kio okazas, oni pensas, ke la plejmalbonaĵo estas malantaŭ ni, oni lasas novan ŝancon, poste alian, poste estas la rutino, kiu trudiĝas. Kaj oni ne eskapas el tio. Fine plej bone estas morti. Tiel oni neniam devas klarigi.. Kiel eblas klarigi neklarigeblaĵon, pravigi nepravigeblaĵon... Tiu monstra vivo englutas nin en insida kaj perversa maniero, kaj tamen ni ne povas defendi nin. Ĉar ni devas alfronti nenomeblaĵon, la inteligenton plej malbonan, kiu volas suferigi, kiu teksas sian tolon iom post iom ĉirkaŭ ni, logproponante al ni belon kaj feliĉon, kirligante nin en danco de salono, nia malgranda salono fermita - ĉar neniu plu vizitas nin, ĉar la pontoj estis lerte rompitaj. Ni kredis, ke la alia amas nin por tio, kio ni estas. Sed li deziris nin nur por tio, kio ni estis fariĝontaj : lia predo. Senkulpa animo kaptita en granda araneaĵo : ju pli ĝi baraktas, des pli ĝi sendas signojn al sia agresanto. Alvokojn al la krimo. Al planita krimo ! Ĉio estas zorge




arанĝita, por ke la malsupreniro en inferon estu perfekta. Estas la malrapida agonio de malgranda libelo, kiu baraktas sed neniam sukcesas liberigi sin. Oni tre rapide perdas siajn kolorojn, malseriozecon, senzorgemon. Oni petas helpon senbrue, kaj kompreneble neniu aŭdas nin. Neniu promenas sin sur nia tolo. Kaj ĝi estas tro larĝa por ke oni aŭdu nin transe. Ĉiel neniu plu konas nin de longe.

Mi amis mian edzon. Mi amis lin trans la unuaj batoj, kiam li ekskuzis sin sisteme, kiam li revenis al mi kun floroj, kun komplezemo. Ĉu mi plu amis lin poste, kiam la batoj fariĝis ĉiutagaj ? Kiam la seksperfortoj finis neniigi min ? Kiam mi fariĝis nur frottuko, kiun oni tordas kaj premsekigas antaŭ ol esti ĵetita teren, antaŭ ol li platigis min kaj trenas min sur la planko kraĉante al mi siajn kruelajn kaj malamajn vortojn ? Mi ne plu scias. La jaroj pasis



kaj mi ne rekonis ilin. Mi foje petegis kaj foje ne kontraŭstaris, kaj seksperforto, kiam oni ne kontraŭstaras, ne plu estas seksperforto, diros iuj al mi. Mi neniam imagis, ke mi estos fine ĉi tie en la hospitalo, mia turmentisto malpermesis al mi imagi kion ajn. Kiam nia cerbo ne plu funkcias, ke nia korpo ne havas la tempon por resaniĝi post la batoj kaj jam ricevas aliajn, la tempo pasas kaj tamen oni ne reagas. Dume ni saltas el la pato en la fajron. Ne patkuko kuirita kun amo, kun unu aŭ du kandeloj sur la tablo kaj bela tablotuko. Malgranda malvarma manĝo de riproĉoj, de boteloj ĵetitaj al la kapo, de glaspecetoj, kiujn oni plukas skrapvundante siajn genuojn, de hararo tirita perforte malantaŭen, dum oni perfortas nian intimecon, kiu ne plu ekzistas delonge.

Tiuj bruoj de birdoj en la arbaro estas neelporteblaj fine. Tio estas tro milda, tro malproksima de tio, kion mi ĵus travivis dum ĉiuj ĉi jaroj, tio estas neelportebla pro naivego. Mi ne sukcesas malstreĉiĝi, mia cerbo ne plu scias rilaksiĝi, kaj mi tre timas, ke mia koro ne plu scias emociiĝi. Sur la aplikaĵo oni proponas bruojn de la urbo. Kiel strange estas voli aŭskulti bruojn tiajn, kiaj hupoj de veturiloj, bruoj de reloj, bruaj interparoladoj por malstreĉiĝi... Estas eĉ la bruo de lavmaŝino, kiu gargaras. Tiun mi konas parkere, mi pasigis horojn, nur aŭskultante cerblavadon mian. Tiu ja apartenis al mia vivo. Kelkaj sekundoj sufiĉas al mi por revidi min en la posta kuirejo, kien li alvenis sen averti kaj min apogpremis kontraŭ la muron. « Oni sentas

odoron de pureco ĉi tie, sed ne eblas diri la samon pri vi, vi naŭzas min !... »

« Mi sentas plu nenion, doktoro », mi diris iun tagon al la kuracisto, kiu ekzamenis min. Mi estis restinta plurajn semajnojn en la komato. « Necesos tempo, reedukado, multe da pacienco, sed oni resanigos vin » li estis respondinta al mi, klopodante por ŝajni konfidema kaj patra. Jes, sendube. Sed ankoraŭ hodiaŭ mi ne estas certa voli denove saniĝi. Mi sentas, ke ankaŭ miaj muskoloj ne volos tion. Estas ankoraŭ tro frue. Li estis rigardinta min kun konfuza mieno tiutage, li estis kompreninta, ke mi parolas ne nur pri la fizika flanko. Li estus volinta, ke mi luktu pli. Viro aŭ virino ĉiam perturbiĝas pensante, ke kiam mi estis knabino, pri tiu fojo, kiam mi aŭdis miajn gepatrojn paroli mallaŭtvoĉe, paroli pri tiuj gestoj, kiujn najbaro havis laŭdire al siaj infanoj. Mi estis kompreninta nenion tiuepoke. Ĉu vere aŭ false, ĉio, kion mi scias estas, ke neniu skandalo okazis iam en la vilaĝo. « Tie, ĉio estas nur ordo kaj beleco, lukso, kvieto kaj volupto » Mi ne scias, kial tiu poemo subite revenas en mian menson. Nur ke ĉio restu bela kaj trankvila ĉe niaj najbaroj. Kio estas en la privata sfero, tio restu en la privata sfero. Kuraĝo postulas movadon, sed ĉar timo igas vin senmova, estas pli facile esti blinda. Neniu skandalo, ĉefe. Neniam. Se nur iu estus teninta siajn okulojn malfermitaj dum ili rigardis min ...



homo identa kun li aŭ ŝi povis suferi pro hororoj. Tio resendas al li bestan bildon de nia speco, kaj nin malhumanigas samtempe. Konsternite de tiu perturba ideo ni persvadas nin tiam, ke ni estas fronte al esceptoj. Estaĵoj kiel mia edzo tamen estas iom oftaj, tiuj brutaloj, kiuj torturas ekzistas ĉie en la mondo, kaj ili devenas el ĉiuj medioj. Multon mi eksciis kun mia psikologino... Kaj tiuj, kiuj rigardas ilin fari estas ĉiuj aliaj. La ceteraj en la mondo. Mi scias, mi ne devus ĝeneraligi, sed parolas mia doloro... Mi ankoraŭ tiel malfacile komprenas. Mi provas klarigi la aferon, kompreni, kial ĉiuj ĉi homoj kun kiuj mi estis en la laborejo – antaŭ ol li demisiigas min –, en la superbazaro – antaŭ ol li definitive malhelpas min eliri –, kial ĉiuj ĉi homoj, kiuj ekvidis miajn bluaĵojn kaj legis la timon en miaj okuloj neniam ion diris, nenion provis. La timo sin mem endanĝerigi sendube. La ekskuzo ne devi miksi sin en tio, kio ne koncernas ilin. Mi memoras, Mia menso iom post iom vekiĝas. Mi povas vidi, ke mi rekonsciiĝas tagon post tago. Mi ankoraŭ ne povas moviĝi sen la helpo de flegistinoj, kaj tio estas bona, ĉar mi timas la tagon, kiam mi devos eliri el ĉi tie kaj denove elmeti min al reala vivo. De kelka tempo mi sukcesis rigardi mian korpon, kiam ili venas por lavi min. Mi provas relerni ĝin. Ne plu disigi min de ĝi. Mi karesis mian ventron pasintan tagon. Mi devas lerni digesti. Tiu ventro, kiu servis nur por ricevi batojn ... Mi neniam povis naski infanon. Iom pro tiu nekapablo naski, tiu sento de kulpo, kiun konstante memorigis al mi liaj ĵuroj, mi pardonis lin tiel ofte en la fruaj tagoj. Dio mia, mi inventis por li tiom da ekskuzoj, dum li torturis min, malrapide mortigis min. Se mi havus filon, mi instruus al li, ke oni povas paroli sen bati, ke oni povas deziri sen perforto, ke oni povas ami sen posedi. Ĉu li aŭskultus min, kun tia modelo hejme? Kreskante, rigardante sian patron, li komprenus, ke

pugnoj, kapo, piedoj, sed ankaŭ sekso povas esti uzataj kiel armiloj. Ke iuj homoj ekzistas nur regante aliajn. Dio mia, bonŝance mi ne donis al li idojn. Tio dezirigas min vomi.

Mi provos dormi post momento. Mi milde remetos mian telefonon sur la litkapon. Miaj agoj ankoraŭ ne estas tre firmaj. Sur tiu telefono, kiun alportis al mi sociala asistantino, mi ne havas kontaktojn, nur kelkajn aplikaĵojn. Ankaŭ neniun virtualan amikon. Li neniam permesis al mi uzi sociajn retojn, kompreneble. Sed ĉiuokaze, vidi lin de malproksime afiŝi siajn bildojn ĉie, aŭdi lin laŭte legi kun venka mieno siajn malpurajn komentojn, virŝovinistajn, rasismajn, homofobajn, pedantajn, sufiĉis por definitive naŭzi min alproksimiĝi al la sociaj retoj.

La vetero estas bela hodiaŭ. La eta ĉielpeco, kiun mi vidas el  mia lito, estas tute blua. Iuj nuboj, kiel en la vivo kompreneble. Koncerne min la plej grandaj nuboj pasis. Mi petis, ke la fenestro restu malfermita. Mi bezonas aeron tiel forte. Mi sufokiĝas en mia kapo, de kiam miaj pensoj malrapide retrovas sian lokon. Antaŭe mi ne plu pensis. Mia cerbo kaj korpo estis tute senigitaj je sentokapablo. Mi sufokiĝas ankaŭ en mia koro. Pro kolero. Kontraŭ li, sed unue kontraŭ mi. En terapio oni proponis al mi renkonti aliajn homojn, kiuj havis la saman historion kiel mi. Ŝajnas, ke iuj, iom rekonstruitaj, intervenas apud junuloj en kvartalaj



asocioj. Mi devas diri al ĉiuj ĉi knabinetoj, ĉi knabetoj, ke neniu rajtas humiligi ilin. Ke ili neniam fanfaronu pri havado de ĵaluza koramiko, kvazaŭ ĝi estus altvalora afero. Li estas ĵaluza ĉar li amas min ... Ne. Li estas ĵaluza, ĉar li havas malamon eble al si mem, al la mondo. Kaj li turnos tiun malamon kontraŭ vin, ĉar tio estos pli facila ol pridemandi sin. Vi fariĝos lia viktimo. Anstataŭ la feliĉo, kiun li promesis al vi, kiun vi promesis al vi mem, kiam, kiel infano, vi ankoraŭ sonĝis. Mi diros al ili ĉion tion, mi rakontos al ili pri mia veno en inferon. Kiam mi retrovos mian voĉon. Mian veran voĉon, ne la sabotan voĉeton, kiun mi ankoraŭ tro ofte aŭdas.

Antaŭe mia advokato venis por diri al mi, ke la proceso ne okazos ĝis la venonta jaro. Ke li ricevis leteron de mia bopatrino. La patrino de la turmentisto. Ke ŝi subtenas sian filon pli ol iam ajn.



Ŝi indignas, estas ŝokita kaj deziras al mi ĉiujn malfeliĉojn de la mondo. Kiel ŝia infano povas troviĝi en tia situacio ? Ŝi konfidis al mi sian filon, mi neniam sciis kiel prizorgi lin. Mi estas malbona, mi puŝis lin ĝis la limo kaj mi estas tiu, kiu igis lin perforta. Ne ekzistas fumo sen fajro ...Mi gape aŭskultis ŝin. Li sciis, ke tiuj vortoj tuŝos min. Li provis konsoli min. Ni gajnos. Ni gajnos! Ni estos pretaj. Mi petis de li paperon kaj skribilon, kaj post lia foriro mi decidis noti, kion mi sentas. La psikologo konsilis min, ŝajnas ke tio helpas rekonstrui sin. Ĝis nun mi neniam havis la forton, sed estas vere, ke la malmultaj vortoj, kiujn mi ĵus skribis, jam sentigas min iomete malsama, kiel iom malpli delikata. Mi devas progresi. Neniu alia krom mi legos tiujn vortojn, kompreneble. Do sur tiu paĝo mi faros promeson al mi mem. Mi, malgranda libelo kun bruligitaj flugiloj, solene anoncas, ke mi rezignas morti. Mi tenos mian promeson. Nu, mi kredas. Nuntempe ĉiuokaze. Mi ankoraŭ ne certas pri tio, kio atendas min, mi ankoraŭ suferas tiom. Sed mi devas komenci ie. Skribi iomete ĉiutage devas helpi min kompreni tiun novan komencon, kiel novan ĉapitron en mia vivo. Mi mislegis la enkondukon, malbone verkis la unuajn ĉapitrojn, ĉi-foje mi zorgos pri mi mem kaj perfektigos mian verkadon. Kopii liniojn kun miaj sentoj, forviŝi miajn timojn, korekti mian koleron kaj mian malesperon, por pli bone turni la paĝon kaj skribi ĉiujn paĝojn de mia nova vivo, de mia morgaŭo, kiu nun komenciĝas.

Kaj memori, ke mi devas skribi per la aktiva voĉo ĉi-foje por ekflugi denove.